

Justinus Kerner,
La plej riĉa princo
tradukita de Manfred Retzlaff

Siajn landojn laŭdegante
|:De l' princaro konsili':²
|:Sidis iam en la halo:|
|:De l' germana imperi'::

”Ja belegas mia lando,“
|:Jen la princo de Saksi':|
|:"Multe da arĝenta erco:|
|:En la montoj havas mi.“:

”Belas ankaŭ mia lando“,
|:La Rejn-princo gloras sin.:|
|:"Ora greno en la valoj:|
|:Sur la montoj nobla vin“.:|

La sinjor' de Bavario
|:Diris: ”Riĉas ankaŭ mi.:|
|:Laŭ trezoroj estas riĉa:|
|:Mia lando ne malpli.“:

Eberhardo, la barbulo,
|:Virtemberga la sinjor',:|
|:Diris: “Ja en mia lando:|
|:Estas nek arĝent' nek or'.:|

Sed ĝi tamen estas riĉa,
|:Trezoregon havas ĝi:|
|:Ke al subularo mia:|
|:Ja konfidi povas mi.“:

Diris la sinjor' Saksia,
|:De l' Rejnland', de Bavari':|
|:“Vi barbula graf', plej riĉa:|
|:El ni ĉiuj estas vi!“:

...

Justinus Kerner,
Der reichste Fürst

Preisend mit viel schönen Reden
|:Ihrer Länder Wert und Zahl,:|
|:Saßen viele deutsche Fürsten:|
|:Einst zu Worms im Kaisersaal.:|

”Herrlich“, sprach der Fürst von Sachsen,
|:"Ist mein Land und seine Macht;:|
|:Silber hegen seine Berge:|
|:Wohl in manchem tiefen Schacht.“:

”Seht mein Land in üpp'ger Fülle,“
|:Sprach der Kurfürst von dem Rhein,:|
|:"Goldne Saaten in den Tälern,:|
|:Auf den Bergen edler Wein!“:

”Große Städte, reiche Klöster“,
|:Ludwig, Herr zu Bayern, sprach,:|
|:Schaffen, dass mein Land den euren:|
|:Wohl nicht steht an Schätzen nach.“:

Eberhard, der mit dem Barte,
|:Württembergs geliebter Herr,:|
|:Sprach: ”Mein Land hat kleine Städte,:|
|:Trägt nicht Berge silberschwer;:|

Doch ein Kleinod hält's verborgen;
|:Dass in Wäldern, noch so groß,:|
|:Ich mein Haupt kann kühnlich legen:|
|:Jedem Untertan in Schoß.“:

Und es rief der Herr von Sachsen,
|:Der von Bayern, der vom Rhein:|
|:“Graf im Bart! Ihr seid der Reichste!|
|:Euer Land trägt Edelstein!“:

...

²aŭ:

|:La princara konsili':|

*Traduko de la Germana poemo "Der reichste Fürst" de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-929-1864 (2013-10-09 18:59:42)

La poemo estas kantebla la jena melodio: http://www.politikundunterricht.de/2_3_01/M_hymnen.htm#fuerst. Tie ĝi estas ankaŭ aŭdebla. Ĝi estas la Virtemberga himno. La muzikantoj troviĝas ankaŭ en <http://www.volksliederarchiv.de/notenpdfs/1999.pdf>.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21).*

Arg-929-1863 (2013-10-17 09:07:31)

Pri la poemo kaj la verkinto vidu la retejojn <http://ingeb.org/Lieder/preisend.html>, http://de.wikipedia.org/wiki/Preisend_mit_viel_schönen_Reden kaj <http://www.youtube.com/watch?v=eGGLN-zrTd0>. Ĝi estas kantebla laŭ la melodio de la germana popola kanto "In des Waldes tiefsten Gründen", kiun verkis en 1799 Christian August Vulpius, la bopatro de J. W. v Goethe. Pri Chr. August Vulpius vidu la retejon http://www.lieder-archiv.de/texte/un-christian_august_vulpius-pid6662.html.